

Putin, la judoj kaj la antisemitismo

Reagoj, sintenoj kaj opinioj flanke de la judoj en Ruslando kaj Ukrainio

Ĝenerala enkonduko, politika karakterizo de la nuntempa Ruslando

Estas internacie konate, ke la populisma rusa propagando, kies spirita gvidanto estas neniu alia ol V.V. Putin mem, sisteme utiligas, krom falsaj argumentoj, manipuloj, tordoj kaj mensogoj, evidente ankaŭ elementojn de rasismaj, kseno- kaj homofobiaj kaj antisemitismaj emocioj por misfamigi nedeziratajn individuojn kaj sociajn grupojn kaj polemiki kontraŭ mem inventitaj „malamikoj“ de Ruslando. Por priservi tiun propagandon funkcias ne nur vaste kaj efike organizitaj ŝtataj reto kaj aparato sed agadas ankaŭ plej diversaj aktivuloj de la rusa ‘civilsocio’, kiuj iel apogas la putinisman sistemon aŭ kiuj estas subtenataj de ĝi aŭ iel ligitaj kun ĝi. La ŝtata propagando estas subtenata de certaj rusaj amaskomunikiloj (precipe televido, interreto, gazetaro), kiuj atingas, ‘informas’ kaj ‘edukas’ la vastan popolon, kiuj estas monopolisme kontrolataj kaj egalŝaltataj de la putinisma kamarilo kaj malpermesas ajnan kritikan pritraktadon de la milit-politiko de Putin. En multaj rilatoj la nuntempa politika kulturo en Ruslando similas pli al carismaj kaj faŝismaj ol al komunismaj tempoj. Koncerne la strukturon de la personeco de Putin mem estas malfacile diri, ĉu ĝi estas pli evidente komparebla kun tiu de Hitler aŭ de Stalin.¹ Ekzistas paraleloj kaj diferencoj.

Dum sia tria prezidenta mandato (ekde 2012) Putin kaj lia klico, kiu kontrolas la ŝtaton kiel en la tempoj de la totalismo, fariĝis pli kaj pli krudaj kaj agresemaj kaj interne de la lando kaj rilate al la ekstera mondo, precipe al certaj postsovetiaj respublikoj, kiuj praktikas sendependan politikon, sed ĉefe al Usono, Eŭropa Unio, NATO kiel parto de la okcidenta mondo, de kiu Putin sentas sin trompata, rifuzata kaj paranoje minacata. Ĉu en la kazo de Putin vere temas pri paranojo aŭ nur pri postsovetiaj refleksoj kaj nekapablo racie kaj efike solvi la problemojn de Ruslando kaj digesti ĝian pasintecon, ne estas klare, sed tio ne estas nia temo. Tiu nekapablo videble kaŭzis pli kaj pli nervozan manieron preni decidojn, laŭ la aktuala politika evoluo. En tio oni povas malkovri mankon de politika plano, aŭ vizio flanke de Putin, sed pensi tiel estus erare, ĉar Putin certe havas iujn ideojn por kiel ‘restarigi’ la iaman potencon kaj influon de Ruslando/Sovetunio, kio okazas laŭ tipe ‘rusa maniero’, kiu estas intuicia, spontana, kaosa kaj anarkiisma kaj kio celas timigi la aliajn, t.e. la (imagitajn) kontraŭulojn. Krom per ĉiuj rimedoj defendi la ekonomiajn interesojn de certa oligarkia tavolo, kiu heredis la politikan povon de la Jelcyn-klando, la ruslanda ŝtatestro volas eviti, eĉ per minacado per nukleaj armiloj,² ke la Okcidento enmiksiĝu en la postsovetian mondon, ĉar tiaj intencoj sabotus lian planon krei la „Eŭrazian Union“, inter alie, kiu probable estas la moderna formo de la ruslanda imperieco. Sed ne ĉiuj postsovetiaj respublikoj estas interesataj pri tiu unio, ĉar en ĝi ili suspektas la intencon de Moskvo restarigi la Imperion.

Antaŭ kelkaj jaroj la rusa propaganda histerio direktis sin ĉefe kontraŭ ĉeĉenoj kaj kartveloj, kontraŭ kiuj Ruslando lanĉis kruelajn militojn kun miloj (sume eble centmiloj) da viktimoj (mortintoj, vunditoj kaj rifuĝintoj), poste la kolero de la Kremlo trafis la estonojn, latvojn kaj litovojn en la baltaj landoj kaj nun ĝi koncernas la ukrainojn, kiujn la Kremlo senskrupule traktas kiel bandon de kontraŭ-rusaj „naciistoj“ ĉar ili rifuzas ludi la rolon de subuloj de Moskvo, al kiuj oni povas laŭplaĉe ordoni kaj kiujn eblas libere ekspluati kiel tio okazis dum jarcentoj en la pasinteco. Anstataŭ tio ili preferas la vojon de

¹ Analoge al la vortludo pri la nomoj de Stalin kaj Putin, la rusa gazetaro inventis la ironian nomon „Putler“, alude al Hitler. Diversaj groteskaj karikaturoj cirkulas en la interreto, kiujn oni trovas se oni serĉas ilin laŭ tiuj frapvortoj.

² Vd. <http://www.aargauerzeitung.ch/ausland/putins-journalist-nr-1-usa-in-radioaktive-asche-verwandeln-127784631>, <http://www.welt.de/politik/ausland/article138291283/Russland-betont-Recht-auf-Atomwaffen-auf-der-Krim.html>, http://www.spiegel.de/politik/ausland/krim-krise-putin-wollte-russische-atomwaffen-aktivieren-a-1023665.html#ref=plist_a, <http://kurier.at/politik/ausland/baltikum-russland-droht-der-nato-mit-atomwaffen/122.812.039>, <http://www.welt.de/politik/ausland/article138664954/Russland-droht-Daenemark-mit-Atomwaffen.html> kaj <http://de.sputniknews.com/politik/20150402/301753308.html>.

naciaj sendependeco (de Moskvo), memstareco kaj suvereneco, kun orientiĝo al Eŭropo, Usono kaj Okcidento, kiuj garantias politikan liberecon kaj ekonomian prosperon. Ĉar en tiuj landoj malfeliĉe aperis ankaŭ kelkaj ekstremdekstruloj sur la politika scenejo, Moskvo klopodas misfamigi iliajn naciajn movadojn kiel „faŝisman“ kaj „naziisman“. Samaj konfliktoj kun armenoj, kazaĥoj, belorusoj, moldavoj kaj aliaj estas antaŭvideblaj, kaze ke ili aŭdacas daŭrigi la kurson de la 'koloraj revolucioj'. Ŝajnas ke la rusaj naciistoj kaj ŝovinistoj ne pretas agnoski la ŝtatan sendependecon de iamaj sovetiaj respublikoj, kiujn ili daŭre konsideras kiel „rusan teron“ („russkaja zemlja“) aŭ almenaŭ kiel influan zonon de Ruslando. Laŭ la imago de la rusaj imperiistoj, al tiu 'komuna' spaco probable devus aparteni ankaŭ Pollando, Rumanio, Serbio, Bulgario, Finnlando kaj aliaj.

La kutima modelo, kiun la Kremlo aplikas, estas ĉiam la sama: Per konstantaj provokado, ĉantaĝado, minacado, intrigado, subfosado kaj (falsa) akuzado kaj asertado (ekzemple ke la sekureco de Ruslando estas minacata) Moskvo provos premi tiujn landojn kaj popolojn, precipe se ili intencas kunlabori kun Eŭropo kaj NATO, kiun Ruslando nun konsideras kiel malamikan potencon. En tio Putin kaj liaj propagandistoj ne hezitas elpuŝi rektajn minacojn, ekzemple ke la rusa armeo kapablos okupi la ĉefurbojn de najbaraj landoj ene de kelkaj tagoj aŭ ke rusaj atombomboj facile povus transformi Usonon en cindran dezerton.³ Ŝajnas ke la tradiciaj manieroj, formoj kaj rimedoj de la rusa demagogio bedaŭrinde eĉ havas certan sukceson, se serioze konsideri la sintenon de la rusoj, kiun respegulas iuj oficialaj moskvaj statistikoj, laŭ kiuj pli ol 80% de la ruslandanoj aprobas la politikon de Putin.⁴ Tiu agresema konduto de la rusoj, kiuj klopodas malstabiligi aliajn landojn, kaj ties sinistraj komplikoj en Donbaso, kie batalas ankaŭ ĉeĉenaj teroristoj, fariĝas vera defio por la tuta monda politiko, kiu tamen celas eviti pli grandskalan militon kun reakciaj kontraŭ-okcidente orientitaj ŝtatoj kiel Ruslando, kiuj finfine daŭre devas esti konsiderataj kiel ekstreme danĝeraj, ĉar ili investas gigantajn monsumojn en la renovigon de siaj armeoj (certe ne nur por defendi sin) kaj do prezentas realan riskon por la mondaj ekvilibro kaj por la paco.⁵

Same agreseme kaj subpreme Putin kaj lia klano de dependaj kaj fidelaj ŝtataj funkciuloj kondukas kontraŭ la ruslanda popolo aŭ civilsocio mem, kiun oni krude misuzas kiel aplaŭdistojn kaj subtenantojn por fortigi la potencon de tiu primitiva diktaturo, kiu posedas mafiajn trajtojn de 'modernaj' oligarĥio kaj plutokratio, kiuj vartas la kartelojn en la ŝtato.⁶ Diversaj etnaj minoritatoj kiel la tataroj (de Kazano) aŭ mareoj riskas rikolti la koleron de la Kremlo, se iliaj gvidantoj montras signojn de nacia emancipiĝo aŭ politika mallojaleco. La rusaj ŝovinistoj profunde malŝatas kaj malestimas tiujn popolojn, kies ekzistorajton ili kontestas kaj kies ekzistadon mem ili konsideras malinda, superflua kaj danĝera por la rusa nacio.⁷ En kazo ke la volo de la centra povo en Moskvo estas malrespektata, se iu ajn aŭdacas publike kritiki kaj kontraŭstari la politikon de la Kremlo, en Ruslando ĉiu etno, ĉiu memstarema grupo kaj ĉiu individuo de la civila socio, kiu ne fajfas laŭ la pipo de la Kremlo, estas aŭtomate subpremata, kontraŭbatalata kaj persekutata, en iuj kazoj eĉ fizike likvidita.

Sub Putin la ŝtataj demagogio kaj ciniko do atingis novan kulminon, novan perfektecon. La internacia publiko jam ne plu eltenas la pasian senhontecon de tiu prezidento, kiu evidente celas montri al la mondo kia kuraĝa ulo li estas, kvankam kiel homo li estas sensignifa, almenaŭ se juĝi laŭ lia biografio.

³ Vd. <http://www.nzz.ch/international/putin-spricht-von-einmarsch-nach-osteuropa-1.18386348> kaj <http://www.spiegel.de/video/russland-fernsehmoderator-kiseljow-redet-von-atomangriff-auf-usa-video-1334802.html>.

⁴ Laŭ VCIOM, Levada-centro k.a. Tamen, 80% kaj pli da subteno por Putin estas verŝajne artefarita (fantazia) cifero de la kremla bluf-propagando, kiu estas manipolata kaj beligata kaj kiu baziĝas precipe sur por-Putinaj-voĉoj. Kompreneble, tiaj altaj aprobo-kvotoj havas tradicion en Ruslando, oni memoru nur la komunisman tempon, kie ekzistis ciferoj de 90% por la regantaj fortoj. Rusaj statistikoj devas esti konsiderataj kun grandaj skeptiko kaj singardo, ĉar kutime ili estas falsitaj. Laŭ iu kritik-mensa ruslanda esperantisto, kun kiu mi korespondas, anstataŭ 80% probable nur maksimume 50-60% reale subtenas la politikon de Putin (verŝajne oportunismo ludas gravan rolon), dum 20% ne subtenas ĝin aŭ rilatas kritike al ĝi, kaj la resto estas indiferenta aŭ malinteresita. Certe, la populareco de Putin dependas de konkretaj aktualaj agadoj kiel ekzemple la tre publik-efika anekso de Krimeo, kiu ŝajne altigis la patriotismajn sentojn inter rusoj.

⁵ Aliaj tiaj danĝeraj ŝtatoj por la Okcidento kaj la monda paco estas Ĉinio kaj Hindio, sed tio estas alia temo, kiun mi ne traktos ĉi tie. Tiom longe ke tiuj ŝtatoj kondukas agreseme interne kaj ekstere, ili devas esti konsiderataj kiel danĝeraj. En principo tio validas por ĉiuj aliaj ŝtatoj, kiuj posedas nukleajn armilojn aŭ planas akiri aŭ produkti ilin.

⁶ Pri la difino de la politika kaj ekonomia sistemoj de Ruslando ne ekzistas interkonsento inter la fakularo. Ekzistas la embarasa karakterizo kiel „gvidita“, „manipulita“ aŭ „imitita“ demokratio. Koncerne la ekononion iuj fakuloj parolas pri „burokratia kapitalismo“, „korporacia merkatekonomio“ kaj „ŝtata monopolkapitalismo“.

⁷ La rusa ŝovinismo kaŭzis, ke grandparto de la etnaj minoritatoj en Ruslando estas minacataj en sia ekzisto (vd. http://en.wikipedia.org/wiki/List_of_endangered_languages_in_Russia.) (Kompreneble ekzistas analogaj listoj por aliaj landoj).

Malgraŭ la novaj problemoj, kiujn Putin kreis, oni ne devas forgesi, ke la ruslandanoj dankas al lia ordo la pliboniĝon de la (materia) vivo en Ruslando: En la urboj la vendejoj estas plenaj de varoj, la ruslandanoj ŝajne vivas pli sekure kaj povas libere vojaĝi eksterlanden kaj praktiki komercan entreprenadon. Tio estas granda progreso kompare kun la tempoj de la komunismo, kiam la vendejoj estis malplenaj, kiam ĉiuj formoj de neoficalaj laboro kaj agado estis rigore malpermesitaj, kiam ne ekzistis libereco de vojaĝado kaj ekonomia entreprenado, kaj kompare kun la tempoj de Gorbaĉov kaj Jelcin, kiam en Ruslando regis plena kaoso, anarkio kaj reĝimo de mafio kaj sovaĝaj gangsteroj.⁸ Certe, en Okcidento, kie tiuj cirkonstancoj estas apenaŭ konataj kaj malfacile kompreneblaj, la gazetaro ofte raportas kaj juĝas malkompetente, supraĵe kaj neobjektive pri la situacio en Ruslando, kie ekzistas alia logiko, aliaj reguloj de la vivo. Spite al tiuj atingoj kaj meritoj de la post-Jelcina erao, kiuj estas esencaj el rusa vidpunkto, ekzistas la probableco, ke la 'bonaj tempoj' de la Putin-jaroj povus esti baldaŭ pasintaj; krom tio ekzistas la suspekto, ke en tiu erao en la nomo de la prezidento, registaro kaj ŝtato estis faritaj gravaj (militaj) krimoj, kiuj devus esti esploritaj de sendependaj juraj instancoj. Dume ankoraŭ neniu scias kio sekvos post Putin.

La tragika spektaklo, kiun Ruslando prezentas al la homaro, estas hontinda, naŭza kaj abomena, fakte giganta skandalo. Bedaŭrinde, Ruslando ludas nuntempe la plej negativan rolon en la mondo, gvidante militojn kontraŭ siaj najbaroj, subpremante la civilsacion en la propra lando, subtenante ĉiujn agadojn, inkluzive de la internacia terorismo, kiuj estas direktitaj kontraŭ la Okcidento, kontraŭ kiu Ruslando praktike kondukas malproklamitan militon. La homaro estus pli feliĉa, se la putinisma reĝimo baldaŭ finiĝus. Multaj respondecaj politikistoj en Ruslando devus jam delonge kompreni, ke tian memmortigan politikon oni ne povas daŭrigi, se oni volas restarigi la normalecon de la rilatoj kun la okcidenta mondo, kiu estas nepre necesa kaj multe pli utila ol la kaprica kaj sensenca kontraŭstarado kontraŭ ĝi.

Kiel montras ĉi tiu mallonga ĝenerala enkonduko, kiu povis aludi nur kelkajn gravajn temojn, la bezono trakti multajn diversajn demandojn, kiuj estas ligitaj inter si, estas grandega. Sed post tiu ĝenerala meditado pri la aktuala situacio en Ruslando mi volas transiri al la ĉefa temo de mia studo, nome la problemoj de la antisemitismo en Ruslando kaj Ukrainio.

Antisemitismo en Ruslando kaj Ukrainio

En diversaj amaskomunikiloj de Ruslando kiel ekzemple en *Komsomolskaja Pravda* kaj aliaj rusaj gazetoj troviĝas de tempo al tempo antisemitismaj tiradoj de malamo. Se en tiu gazeto oni skribis pri la „honto de Ruslando“ kun fia aludo al certaj homoj kun judaj nomoj, kial do oni ne menciis ankaŭ la nomojn de la veraj antisemitoj de Ruslando mem? La ideologio kaj lingvaĵo de la plej fama rusa demagogo Vladimir Ĵirinovskij, ĉefa ĉarlatano de la „liberaldemokratia“ partio de Ruslando, kiu estas preskaŭ ĉiutage videbla en la ŝtata televido kiel grava, konsiderinda kaj konsultinda politikisto de la t.n. „parlamentara opozicio“ en la Dumao kaj kiu cetere mem estas de juda deveno, jam ĝissate montris krudajn antisemitismajn, rasismajn kaj ksenofobiajn trajtojn, kiujn Putine ŝajne toleras. Libereco de la opinio laŭ rusa maniero (nu, en Francio ekzistas Le Pen kaj en aliaj okcidentaj landoj ekzistas aliaj tiaj tipoj)!

Sendube, ankaŭ en Ukrainio ekzistas antisemitismo,⁹ sed ĝi estas kaŝita kaj dume praktike ne pli forta aŭ sentebla ol en Ruslando mem, kie ĝi tradicie aperadis kiel krypto-antisemitismo¹⁰ precipe sur registara, do ŝtata nivelo.¹¹ La rusa popolo mem probable estas averaĝe ne pli antisemitisma ol ajna alia kristana popolo de Eŭropo (la antisemitismo estas precipe kristana, tuteŭropa fenomeno aŭ problemoj).

⁸ Pri tiu tempo legu la libron de Paul Klebnikov: *Godfather of the Kremlin: The Decline of Russia in the Age of Gangster Capitalism*, kiu ekzistas ankaŭ en alilingvaj tradukoj. Ankaŭ Klebnikov estis mortigita post kiam li aperigis sian libron.

⁹ Ĉi-rilataj aktualaj sociologiaj enketoj eble ekzistas sed ne estas konataj al mi. Kelkajn informojn vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/Antisemitism_in_Ukraine.

¹⁰ Krypto-antisemitismo aŭ „sekundara antisemitismo“ enhavas kaŝitajn judfobiajn formojn esprimitajn surbaze de tabuoj en rilataj kun- aŭ subtekstoj.

¹¹ Mi celas precipe la antisemitismon, kiu formis parton de la politiko kaj justico de ruslandaj caroj (precipe dum la regado de la du plej lastaj Aleksandro III. kaj Nikolao II., kiuj suspektis judojn kaj polojn kiel murdistojn de Aleksandro II.) kaj la kontraŭcionismon, kiu estis integra parto de la ŝtata ideologio dum la bolŝevisma/stalinisma/komunisma periodo en Sovetunio kaj en la tuta orienta bloko.

Tamen, tio tute ne signifas, ke la rusoj aparte ŝatus la judojn. Male. Ĝis hodiaŭ en Ruslando oni akuzas la judojn, ke ili kulpas pri la "problemoj" de la komunismo en Sovetunio.¹²

Povas esti, ke Stepan Bandera ludis gravan rolon en la historio de Ukrainio,¹³ sed la denunciado de certaj centraj ukrainaj politikistoj, kiuj estis elektitaj de la ukraina popolo en liberaj balotoj, kiel Bandera-banditoj fare de la primitiva putinisma milit-propagandaĉo, kiun oni devas elteni ĉiutage en la ŝtata rusa televido, estas troigita, stulta, ridinda, erara, nepravigebla kaj do havas neniun sencon krom konfuzi la publikon. Kompare kun la senprecedencaj krimoj, kiujn la komunistoj aranĝis sub Lenin kaj Stalin en Sovetunio – oni pensu nur pri la Ruslanda Interna Milito (1917/8-20/1) aŭ la malsatkatastrofo en Ukrainio en la 30aj jaroj (t.n. Holodomor), kiuj kaŭzis milionojn da mortviktimoj ankoraŭ antaŭ ol Stalin komencis siajn grandskalan tutlandan teroron kontraŭ „kulakoj“, „popolaj malamikoj“, diversaj etnaj kaj religiaj grupoj k.a., – Bandera estis verŝajne malgranda fiŝo, kvankam ŝajnas, ke lia organizaĵo respondecas pri la morto de kelkmil homoj, precipe judoj kaj komunistoj. Se oni jam parolas pri antisemitismo en Ukrainio, oni devus menci i ankaŭ la kontraŭjudajn pogromojn organizitajn de Bohdan Ĥmelnickij en la 17a jarcento¹⁴ kaj de Symon Petljura en la tempo de la menciita Ruslanda Interna Milito. Laŭ pritakso de Aleksandro Soljenicyn, sub la furoro de la Petljura-milicoj estis mortbatitaj pli ol 50'000 judoj. Kaj Petljura kaj Bandera kaj Skoropads'kyj estis komplikoj de la germanoj kaj konvinkitaj kontraŭuloj de judoj kaj komunistoj. Ĉu ili estis antisemitoj aŭ ne, oni povas diri, ke tiuj ukrainaj gvidantoj faris veran pakton kun la diablo.¹⁵ Krom tio, oni ne forgesu la kontraŭ-judan politikon kaj la kontraŭ-judajn pogromojn, kiuj en Ukrainio kaj Rusio okazis ankoraŭ en la carisma tempo, precipe sub Aleksandro III. kaj Nikolao II.¹⁶ Dum la sovetia tempo ĉiuj tiuj problemoj estis prisilentitaj, forviŝitaj, false prezentitaj kaj reinterpretitaj. Pro tio hodiaŭ la homoj en la postkomunismaj landoj estas malbone informitaj pri la veraj faktoj kaj problemoj de la historio; iliaj mensoj estas influitaj, konfuzitaj kaj perturbitaj de la primitiva demagogia propagando de la koncernaj ŝtatoj, kiuj kutimas mensogi kaj tordi la faktojn, fakte ĝis nun, kaj sur ĉiuj flankoj. Sed utiligi argumentojn de la historio estas tikla afero, ĉar akuzoj direktitaj kontraŭ unu flanko povas esti responditaj de la dua flanko per analogaj akuzoj kontraŭ la alia. Pro tio ankaŭ la glorado de dubindaj ukrainaj herooj kiel Ĥmelnickij, Petljura aŭ Bandera fare de la naciisma propagando en Ukrainio estas tikla kaj ne nepre rekomendinda afero, ĉar ĝi povas vekti nedezirindajn agresemajn sentojn kaj emociojn ĉe aliaj popoloj (komparu la kverelon ĉirkaŭ la Mohamed-karikaturoj).

Koncerne la antisemitismon en orienta Ukrainio, la ĉefrabeno de Donecko, Pinĥas Viŝedskij, konfirmis, ke en ĝiaj ruslingvaj regionoj antisemitismo apenaŭ ekzistas, kompare kun la okcidenta parto de la lando, kie tiu fenomeno ŝajne estas pli viva.

Sed ŝajnas ke la dekstrema partio „Svoboda“ kaj ties obskura ĉefo Tjahnibok grandparte rezignis pri antisemitisma retoriko, kiam tiu partio fariĝis parto de la registaro. Kaj la lastaj parlamentaj elektoj en Ukrainio, en kiuj la demokratiaj kondiĉoj estis restarigitaj, montris, ke ekstremdekstraj fortoj havas nenian ŝancon esti reprezentitaj en la ukraina parlamento, do ili finfine ŝajnas esti marĝena kaj malmulte influa

¹² Signifaj juddevenaj sovetiaj gvidantoj de la 20-30aj jaroj estis i.a. Trockij (Bronŝtein), Kamenev (Rozenfel'd), Zinov'ev (Apfelbaum), Kaganoviĉ, Sverdlov (Gauŝman), Radek (Sobelsohn), Martov (Cederbaum), Axelrod, J.M. Jurovskij (alias Jankel Ĥaimoviĉ, kiu gvidis la murdon de la cara familio), E.M. Jaroslavskij (Gubel'man), Il'ja Ehrenburg k.a. Aleksandr Soljenicyn levis la kontesteban aserton, ke la judoj portas la „moralan respondecon“ por la fiaskinta sovetia eksperimento. Per tio la ultranaciisma rusa aŭtoro mem danĝere alproksimiĝis al antisemitismaj pozicioj (precipe en sia verko *Ducent jarojn kune*), kiel Aleksandr Osovcev, la eksvicprezidanto de la „Ruslanda Juda Kongreso“ avertis, kaj riskis perdi sian bonan reputacion kiel verkisto pri la gulago.

¹³ Lia partopreno en la masakro de Lvivo fine de junio 1941 ne estas pruvita kaj li mem restis iom nebula figuro, ĉirkaŭ kiu konstruiĝis diversaj legendoj. Novan libron pri „Stepan Bandera kaj la sorto de Ukrainio“ verkis Leonid Mleĉin (lian ĉi-rilatan filmon vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=cM89WthoCDE>).

¹⁴ Por la rusoj Bohdan Ĥmelnickij havas apartan signifon, ĉar en 1648 li direktis sin al la rusa caro Aleksej I. kaj petis lin submeti la ukrainan kozakan ŝtaton sub la kontrolon de Ruslando. El tio sekvis la Kontrakto de Perejaslav de la 8a de januaro 1654, ĉe kiu, laŭ rusa interpreto, temas pri la teritoria aligo de la ukraina kozaka ŝtato al la cara imperio. Pro tio la ruslandaj politikistoj kaj historiistoj evitas polemiki kontraŭ Bohdan Ĥmelnickij, kiu por la ukrainaj kozakoj signifas kvazaŭ-sanktan ikonon kaj por la rusoj estas heroo.

¹⁵ Vd. <http://www.zeit.de/2014/14/ukraine-unabhaengigkeit>.

¹⁶ Koncizajn informojn vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_der_Juden_in_Russland#Alexander_III. De la naciisma rusa propagando Aleksandro III., kiu longan tempon estis neglektita kaj negative pritaksita en Ruslando, nuntempe estas laŭdata en plej alta kaj pozitiva tono, ĉar i.a. li kondukis rusan naciisman politikon kaj rekonstruis fortan rusan armeon. Pri ilia reakcia antisemitisma sinteno la rusa propagando tamen silentas. (Tian ekzemplon vd. sub http://expert.ru/expert/2015/13/dlinnyj-vek-posle-aleksandra_x/?777).

fenomeno en Ukrainio mem. Do, al la aserto de la rusa propagando, ke Ukrainio estas regata de faŝistoj, mankas ĉia bazo, sed ĝi estas pura elpenŝaĵo, nura fabelo, kiu celas misfamigi kaj diskrediti la ukrainajn politikistojn, kiuj deziras nenion alian ol la nacia memstareco kaj ŝtata sendependeco, same kiel la estonoj, latvoj, litovoj, poloj, kartveloj, armenoj, kazaĥoj, belorusoj kaj aliaj havas ĝin.

Fakte, tiuj kiuj efektive kaj publik-efike ludis/as per antisemitismaj sentoj, estas la separatistoj de la mem elektitaj „popolrespublikoj“ en Doneck kaj Luhansk mem. En februaro 2015 Aleksandr Saĥarĉenko, „ĉefministro“ de la „Donecka popolrespubliko“, estis citita per la vortoj, ke en Kievo regas „mizeraĵaj reprezentantoj de la granda juda popolo“, dum Igor' Plotnickij, la ne malpli obskura „ĉefministro“ de la „Luhanska popolrespubliko“, uzis la nomojn de la „oligarkoj Walzman, Hrojsman kaj Kolomojskij, por kiuj la ukrainaj soldatoj signifas nur kanonan nutraĵon.“ Inter antisemitoj en Ruslando kaj Ukrainio cirkulas la aserto, ke la ukraina prezidento Poroŝenko reale nomiĝas Walzman kaj estas judo.¹⁷

Judoj en Ukrainio estas konvinkitaj, ke pri la antisemitismaj atakoj, kiuj estis direktitaj kontraŭ sinagogoj en Krimeo aŭ kontraŭ aliaj judaj instalaĵoj aŭ lokoj ligitaj kun la juda historio (ekzemple ŝmirado en Babij Jar), kulpas certaj anonimaj provokantoj, kiuj estas speciale engaĝitaj por taskoj en tiu specifa kunteksto. Post tiaj atakoj, rabeno Moŝe Asman de la judortodoksa komunumo de la kieva Brodsky-sinagogo, alvokis la judojn forlasi la urbon. Laŭ Jozefo Zissels, prezidanto de la „Unuiĝo de judaj organizaĵoj kaj komunumoj en Ukrainio“, la celo de la kontraŭ-judaj atakoj en Ukrainio estas disvastigi timon kaj hororon inter la judoj por krei malamon ĉe la monda publiko kontraŭ la ukraina registaro, kiun la Kremlo celas diskrediti per falsaj kaj perfidaj akuzoj. Sed pluraj reprezentantoj de la judaro en Ukrainio rifuzis la asertojn de la rusoj kaj avertis, ke la judoj de Ukrainio ne bezonas rusan „protektion“. Vadim Rabinoviĉ, la prezidanto de la „Tutukrainia Juda Kongreso“, kiu kandidatiĝis por la prezidenteco en Ukrainio, diris, ke li volas ĉesigi ĉiujn mitojn kaj legendojn pri laŭdire antisemitisma socio de Ukrainio, kiujn oni disvastigas en la tuta mondo.

Cetere, ekstremdekstruloj el Ruslando batalas sur ambaŭ flankoj de la ukraina konflikto, kaj ŝajnas, ke la rusia justico persekutas nur tiujn, kiuj batalas sur la ukraina flanko.¹⁸ Kvankam la rusa milit-propagando senlime troigas ilian danĝerecon, oni tamen ne subtakso ilian rolon kaj bone observu ilian agadon. Kompare kun okcidenta Eŭropo kaj la araba mondo, kie antisemitismaj aktivecoj lastatempe danĝere kreskis, ili grandparte mankas en Ukrainio en tiu formo. Ĉar grandparto de judoj forlasis Ruslandon kaj Ukrainion, ili apenaŭ plu estas videblaj en tiuj landoj, kaj antisemitismo tamen furoris ankaŭ sen judoj.

Do, la artefarita histerio de la rusa propagando kontraŭ la „faŝismo“ kaj „naziismo“ en Ukrainio ne povas esti serioze konsiderata, ĉar la faŝismo kaj naziismo, kiujn la rusoj imagas kaj timas, tute ne ekzistas en Ukrainio, aŭ ne estas aktiva. Se la rusa kritiko estus honesta kaj objektiva, ĝi direktus sin en konsekvenco samtempe ankaŭ kontraŭ ekstrem-dekstraj fortoj en Ruslando mem kaj kontraŭ aliaj dekstremismaj politikaj fortoj en Eŭropo – ekzemple kontraŭ la hungaraj partioj Fidesz kaj Jobbik, kontraŭ la partopreno de ekstremdekstruloj en la nova obskura greka registaro de Cipras, kaj, last but not least, kontraŭ la Nacia Fronto de Le Pen en Francio, kiu evidente ricevis krediton de iu rusa banko, kiel oni povis legi.¹⁹ Ĉiuj tiuj partioj certe ne estas amikoj de la judoj sed simpatias kun Putin, kiel oni povis observi. Ŝajnas, ke Putin, kiu estas kolera pri la sankcioj, kiujn la Okcidento enkondukis kontraŭ lin, subtenas ĉiujn tiajn kontraŭ-eŭropajn fortojn, sendepende de tio ĉu ili estas dekstraj aŭ maldekstraj, faŝismaj aŭ komunismaj, sed gravas ke ili kritikas la politikan ordon de Eŭropa Unio. Do, la rusa kritiko kontraŭ la ukraina „faŝismo“ kaj „naziismo“ ne estas kredinda, ĉar ĝi direktas sin subjektive unuavice kontraŭ la ukraina registaro, ne ĉar laŭdire ĝi estas „faŝisma“, „naziisma“ aŭ ekstremdekstra, sed ĉar ĝi estas sendependisma kaj ukrainisma kaj ĉar ĝi rifuzas ricevi politikajn diktojn kaj ordonojn el Moskvo, de kiu la ukrainoj volas esti sendependaj. Kio estas ilia plena rajto.

¹⁷ Vd. <http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/portraet-der-rebellen-plotnickij-und-sachartschenko-13425627.html>.

¹⁸ Vd. http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen287.pdf?utm_source=newsletter&utm_medium=email&utm_campaign=Russland-Analysen+287&newsletter=Russland-Analysen+287.

¹⁹ Vd. <http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/wladimir-putins-vertrauter-finanziert-front-national-13283387.html>, <http://www.zeit.de/politik/ausland/2014-11/front-national-frankreich-kredit-russland>.

Ukraina naciismo kaj la judoj

Ne nur la ukrainaj politikistoj mem, sed ankaŭ la manifestaciantoj de la Majdano en Kievo estis konsiderataj de la rusa propagando kiel „faŝistoj“ kaj „naziistoj“. La 4an de marto 2014 Putin kredis rimarki en la publiko de Majdano ĉefe „reakciajn, naciismajn kaj antisemitismajn fortojn“. Tute malprave. La vero estas, ke sur la Majdano manifestaciis heterogena publiko, kiu unuavice celis la forigon de la korupta, kleptokratisma ŝtatelito ĉirkaŭ prezidento Janukoviĉ, kiu funkciis kiel protektito kaj servisto de la Kremlo kaj rifuzis subskribi iun gravan kontrakton pri kunlaboro kun la eŭropanoj. Kiam la provizora registaro de Ukrainio estis instalita post la puĉo kontraŭ prezidento Janukoviĉ, la propagando de la Kremlo tuj lanĉis laŭtan histerion kaj avertis, ke la majdana movado signifas grandajn minacon kaj danĝeron *ankaŭ por la judoj*. Per tiaj dubindaj hipotezoj oni evidente klopodis enmiksi kaj enluli ankaŭ la judojn, kiuj en principo havas nenion komunan kun la ukraina krizo.

Certe, en tiu heterogena publiko de la Majdano troviĝis ankaŭ dubindaj kaj agresemaj elementoj, kiuj estis eĉ armitaj, sed la granda plimulto serioze kaj pace manifestaciis por konfirmi la sendependecon de Ukrainio kaj ĝian integriĝon en la eŭropaj strukturoj.²⁰ Kvankam do iuj dekstremismaj ukrainaj grupoj inkluzive de tiaj, kiuj reprezentis en la pasinteco antisemitismajn poziciojn, ludis ian rolon en la opozicia movado, la plimulto de la oficialaj judaj reprezentantoj en Ukrainio ne aprobis la karakterizon faritan de Putin kaj ankaŭ kondamnis la enmiksiĝon de Moskvo en Krimeo.

Do, la aserto de la rusa propagando, ke la transpreno de la povo fare de la „majdanistoj“ en Kievo kondukis al kresko de antisemitisme motivitaj atakoj, evidente estis maltrafa kaj senbaza. Tiaj altgrade falsaj eldiroj, kiuj havas la solan celon diskrediti la manifestaciantojn de Majdano kiel antisemitisman kaj faŝisman movadon, estis rifuzitaj de la ukrainiaj judoj mem, ĉar ili ne respegulas la faktojn aŭ la realecon sed multe pli parolas pri la veraj intencoj kaj celoj de tiuj, kiuj produktas kaj disvastigas ilin. La ĉi-rilataj tordoj kaj misinterpretoj apartenas al la sama kategorio kiel la rusaj mensogoj kaj manipuladoj, kiuj evidente ludis esencan rolon dum la ruze fiaranĝita, fakte raba transpreno de Krimeo fare de la Putin-bando en marto 2014.²¹

Certe, ne estas sekreto, ke sur la Majdano staris ankaŭ iuj judaj intelektuloj kaj eĉ rabenoj, kiuj apogis la supre menciitan celaron de la Majdana movado, kvankam tiu movado esprimis sin esence naciisme kaj kvankam la judoj pledis por neŭtraleco. Se la Majdana movado estintus antisemitisma, la judoj certe ne estus apogintaj ĝin.²²

Estas interese, ke jena judo ne staris sur la Majdano: *Josif Davydoviĉ Kobzon*, naskita en 1937 en Ĉasov (Ĉasiv) Jar, donecka distrikto, Ukraina SSR. En Ruslando li estas konata, adorata kaj altrange dekorata kiel popola artisto de USSR, kies kant-repertuaro ampleksas ĉefe patriotismajn kaj soveti-stilajn titolojn same kiel glorkantojn pri la sovetia armeo. Feliĉe aŭ malfeliĉe, la „oficiala voĉo de Sovetunio“, kiel Kobzon ankaŭ estas nomata, politike aktiviĝis kiel deputito kaj unua anstataŭanto de la prezidanto de la kultura komitato de la ruslanda Dumao, kaj, de 2003, kiel membro de la partio „Unueca Ruslando“. Laŭ onidiroj, Kobzon havis/as rilatojn al iuj organizitaj krimuloj (mafio) kaj estas konsiderata kiel bona konato de la fifama moskva eksurbestro Luĵkov. Pro tio kaj pro lia politika rolo la kantiston el Donbaso trafis seriozaj sankcioj: En 1995 li ricevis malpermeson viziti Usonon. Lige kun la krizo en Ukrainio la arda defendanto de la politiko de la Kremlo ricevis ankaŭ malpermeson viziti Ukrainion; radikalaj ukrainaj naciistoj eĉ proklamis lin „persona nun grata“ kaj klopodis malhelpi al li aperi en la ukraina televido. Latvio rifuzis lin kiel partoprenanton en la kantfestivalo de Jurmala en somero 2014. Krom tio, Kobzon perdis la honoran civitanekon de tuta vico de ukrainaj urboj. Al tio la punita artisto reagis per la sarkasma rimarkigo, ke „por mi ne ekzistas tia Ukrainio, en kiu ekzistas faŝisma reĝimo“, kaj

²⁰ Alian groteskan version prezentis Nikolaj Azarov, eksĉefministro de Ukrainio, en intervjuo por la svisa ĵurnalo *Weltwoche* de la 1a de aprilo 2015, laŭ kiu la manifestaciantoj sur Majdano estis antaŭ ĉio „pagitaj senlaboruloj el okcidenta Ukrainio“ (vd. <http://www.weltwoche.ch/weiche/hinweisgesperrt.html?hidID=553698>)

²¹ La krude manipulita „referendumo“ sur Krimeo en marto 2014, kiu okazis sub la kondiĉoj de rusa armea okupacio, kiu estis bojkotita de la tataroj de Krimeo kaj falsita (vd. <http://www.nzz.ch/aktuell/startseite/krim-referendum-stark-gefaelscht-1.18296089>), cetere estis „observita“ de „Eŭropa Observaĵo por Demokratio kaj Elektado“ (Observatory for Democracy and Elections), kiu estas konata kiel obskura kolektiĝo por antisemitoj, eksdemokstruloj, nov-naziistoj kaj konspir-teoriistoj. Ĝin eblas konsideri kiel pseŭdan kaj farsan organizaĵon, kiu celas funkcii kiel alternativo al OSKE en la ruslanda sfero de la mondo; krom Moskvo neniu agnoskas ĝin.

²² Vd. <http://www.welt.de/politik/ausland/article125252346/Wie-antisemitisch-sind-die-Maidan-Demonstranten.html>.

fajfis pri siaj honoraj civitanecoj. En oktobro 2014 Kobzon elpaŝis en Donecko kune kun la separatista gvidanto Saĥarĉenko. Ĉar Kobzon engaĝiĝis por la popolrespublikoj de Donbaso kaj la anekso de Krimeo, la separatistoj nomumis la popolan heroon de la rusa patriotismo „honora konsulo“ de la neagnoskita „Donecka Popola Respubliko“ en Rusio.²³ En februaro 2015 ankaŭ Otavo metis lin sur la liston de personoj, kiuj ne rajtas viziti Kanadon, same faris Svislando en marto.²⁴ Tiel, ankaŭ la judo Kobzon, kiu iomete aspektas kiel „Mr. Spock“ (kiu cetere ankaŭ havas juddevenajn radikojn el Ukrainio) en la filmo „Spacoŝipo Enterprise“ de la „Star-Trek“-serio, fariĝis tragika figuro de la konflikto en orienta Ukrainio, kiu ricevis militan karakteron kaj laŭ UN kaŭzis almenaŭ 6000 mortviktimojn kaj 1-1,5 milionojn da forpelitoj kaj rifuĝintoj ĝis la fino de februaro 2015. En kiu grado Kobzon estas koncernata de la antisemitismo estas malfacile diri.

Putin kaj la judaj oligarkoj

Kiam Putin lanĉis sian privatan ‘militon’ kontraŭ juddevenaj oligarkoj kiel Gusinskij, Berezovskij kaj Ĥodorkovskij, oni ne tute komprenis, ĉu tiu nova kampanjo estas *ankaŭ* antisemitisme motivita aŭ ĉu la judeco de tiuj konkurentoj ludis neniun rolon kaj estis nura hazarda koincido. De iu oficiala parolisto de la Kremlo Berezovskij tamen estis nomita „bakterio, kiu loĝas en putra korpo sed mortas se la korpo resaniĝas“. Ĥodorkovskij estis konsiderata de Putin kaj de vasta parto de la popolo kiel ekspluatanto de la ekonomiaj resursoj de Ruslando.²⁵ Nur la (juda) oligarko Abramoviĉ estis mirakle protektita de Putin, ĉar li ne elpaŝis kiel persona aŭ politika rivalo aŭ kiel ekonomia konkurento kiel la aliaj. Sed ankaŭ en Ukrainio okazis konfliktoj kun lokaj oligarkoj, kiuj rifuzis ludi la idioton de la Kremlo kaj faris memstaran politikon, kiel ekzemple Ihor Kolomojskij. De juda deveno kaj ŝtatano de Israelo, li fariĝis guberniestro de la distrikto Dnepropetrovsk kaj subtenis la ukrainan armeon per sia mono, pro kio la rusa propagando tuj lanĉis laŭtan kampanjon kontraŭ tiu ukraina oligarko. La kverelo estis akompanata de malbela retoriko: Dum Kolomojskij nomis la rusan prezidenton „malgrandan skizofreniulon“, Putin venĝis sin, nomante lin „trompisto“ kaj „kanajlo“.²⁶

Ke la rusa propagando estas libera de antisemitismaj elementoj, estas do apenaŭ kredeble, ĉar tiuj influoj aperas en subliminala, kaŝita formo. La malnovaj imagoj pri la konspira rolo de la judoj, kiel ĝi estis formulita en la „Protokoloj de la Cionaj Saĝuloj“ (aperinta en Ruslando en 1903), probable daŭre vivas en la cerboj de certaj rusaj intelektuloj, politikistoj kaj iamaj sekretservistoj. Nota bene: Ankaŭ Boris Nemcov, la rusa opoziciulo, kiu estis mortpafita fine de februaro 2015 en Moskvo, havis judan patrinon, do en principo estis judo, se li mem konsideris sin tia. Nemcov intencis publikigi raporton pri la vera rolo de Ruslando lige kun la milito en Ukrainio, sed la kaŭzoj kaj motivoj de lia likvido, en kiu ŝajne ĉeĉenoj estis envolvitaj, dume ne estas klaraj.²⁷

Reciproka flatado inter Putin kaj la judoj de Ruslando

Tiel, ankaŭ en la putinisma Ruslando ekestis specifa formo de rilatoj al la judoj, kiuj esprimas sin kiel ŝajne bonvola zorgemo de la ŝtato pri tiu popolo. Post kiam en la pasintaj 20-30 jaroj miloj da judoj forlasis Ruslandon, restis ankoraŭ 230'000 personoj de juda deveno, kaj oni devas timi, ke post kelkaj jardekoj ankaŭ ilia nombro ŝrumpas kaj ke la judoj preskaŭ tute malaperos aŭ elmortas en Ruslando, ĉar tie simple mankas la kondiĉoj por bona juda vivo.²⁸ Ŝajnas ke Putin intencas haltigi tiun negativan

²³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Iossif_Dawidowitsch_Kobson (kompletige vd. la alilingvajn versiojn).

²⁴ Vd. <http://www.sueddeutsche.de/politik/sanktionen-gegen-jossif-kobson-putins-barde-1.2353556> kaj <http://ria.ru/society/20150218/1048357174.html>; <http://rus.postimees.ee/3114483/shvejcarija-nalozhila-sankcii-na-kobzona-rossijskih-generalov-i-motorolu>.

²⁵ Kiel konate, tiuj tri oligarkoj travivis teruran sorton: Kiam ili ekhavis gravan konflikton kun Putin, Gusinskij fuĝis en 2001 al eksterlando (Hispanio kaj Israelo) por eskapi sian arestadon en Ruslando. Ĥodorkovskij, kiu kuraĝis resti enlande, estis subite arestita en 2003 kaj pasigis dek jarojn en gulag-similaj prizonoj de Siberio kaj Karelio (nun li loĝas en Svislando). Berezovskij, kiu komence ankoraŭ subtenis Putinon, forpasis en 2013 en Londono pro suicido aŭ mortigo.

²⁶ Vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Ihor_Kolomojskij.

²⁷ Vd. <http://www.nzz.ch/international/europa/bericht-zu-putins-luegen-1.18496820>.

²⁸ Vd. <http://www.km.ru/biznes-i-finansy/2000/09/17/glavnye-biznes-temy/cherez-sto-let-v-rossii-ne-ostanetsya-ni-odnogo-evre>.

evoluon. Konsiderante aliajn subpremajn agadojn, kiujn Putin lanĉis kontraŭ aliaj grupoj en Ruslando, kiujn li konsideras kiel kritikistojn kaj malamikojn, la skeptikuloj tamen ne tro fidus tiun novan interesiĝon de Putin pri la judoj.

Koncerne la historian rolon aŭ „kulpon“ de la judoj, Putin faris en la pasinta tempo plurajn kuriozajn aludojn, kiuj rekte invitas ne nur al revizio, reinterpretado kaj falsado de la historio, sed kiuj povas ankaŭ starigi premisojn por novaj formoj de ŝtataj ĉikanado, diskriminaciado, persekutado, subpremado kaj venĝemo.

Kiam Putin vizitis la judan „Centron pri Toleremo“ en Moskvo en junio 2013, li faris en sia alparolado strangajn, fakte timigajn rimarkojn, tiel ke por la ĉeestantoj verŝajne ekzistis kialo por harhirtiĝi. Putin diris, ke „ni scias kiu kulpas pri la milionoj de mortintoj de Ruslando, kaj tion oni ekscios kiam la arkivoj estos malfermitaj, ke tiam la monda publiko ekscios la veron“. Tipa ambivalenta frazo, kiu postlasas enigmon kial Putin trovis tian formulon. En tiu okazo Putin atentigis la ĉeestantojn, ke 80% de la unua sovetia registaro konsistis el judoj.²⁹ Bone, sed kion tiuj aludoj devis signifi?

Alia ekzemplo, kiu baldaŭ sekvis la supre menciitan: La 9an de julio 2014, antaŭ probable profunde mirigita internacia delegacio de rabenoj el Israelo, Germanio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Italio, Francio kaj Nederlando Putin cinike citis kaj kvazaŭ laŭdis la nazian propagandan ministron Goebbels kiel „talentitan mensoganton“ kaj kritikis tiujn, kiuj tordas la historiajn faktojn“, nature sen klarigi pri kiuj konkrete temas kaj sen konfesi, ke ĝuste la sovetia historiografio tordis ilin.³⁰

Ŝajnas ke Putin celas vekti la impreson, ke li bonvole rilatas al la ruslandaj judoj sed eble nur al certaj, nome al tiuj, kiuj flatas kaj ne kritikas lin. Ŝajnas ankaŭ ke li favoras precipe la judojn de la ĥasidisma Ĥabad-Lubaviĉ-movado – la diablo scias kial – kun kiu estas ligita ankaŭ la ruslanda ĉefrabeno Ber(e)l Lazar.³¹ Putin invitis lin por la inaŭgura ceremonio de la Olimpiaj Ludoj en Soĉi, kaj ĉar ĝi okazis sabate, Lazar rifuzis ĝin kun la klarigo, ke en sabato li ne rajtas porti dokumentojn. Kiel Boruĥ Gorin, grava kunlaboranto de Lazar kaj gvidanto de la „Moskva Juda Centro kaj Centro por Toleremo“, klarigis, Putin ordonis aranĝi por Lazar, ke li povu trairi specialan enirejon preter la sekurecaj instalaĵoj. Laŭ Gorin tiu komplezo, kiu estis „unika en la historio de Ruslando“, devis pruvi la pozitivan kaj honestan sintenon de Putin rilate la ruslandajn judojn. Tio povas esti granda avantaĝo por la juda vivo en Ruslando, kiu do, kiel montras ĉi tiu epizodo, ŝajnas dependi de la personaj kapricoj kaj sentoj de la ŝtatestro. Kiam Putin vizitis Israelon en 2012, inter liaj akompanantoj troviĝis ĝuste ankaŭ tiu sama Ber(e)l Lazar. En Jerusalemo li persone kondukis la prezidenton al la Okcidenta Muro (nomata ankaŭ Muro de lamentadoj). Laŭ Cvi Gitelman, profesoro pri judaj studoj en la universitato de Michigan, tiu akompano devis demonstri la intiman ligan de Putin al la Ĥabad-judoj, ligo kiu povus havi reciprokajn utilojn. Sed ne ĉiuj judoj vidas tiun subtenon kun entuziasmo. Ekzemple Roman Bronfman, eksmembro de la israela parlamento, vidas la „ĉirkaŭbrakumadon“ de la judoj far Putin pli kritike, suspektante, ke tiu „varma“ rilato ne signifas pli ol rimedo por atingi la celon. Bronfman ne tro fidus la „romantikan“ „amon“, kiun Putin ŝajne sentas por (certaj) judoj. Laŭ li, Putin dependas de siaj ekonomiaj kunlaborantoj, inter kiuj estas pluraj judoj.³²

En Israelo Putin montris komprenemon por la danĝeroj, kiujn tiu lando alfrontas en la regiono kaj avertis, ke „li ne permesos, ke la miliono de (rusaj) judoj“, kiuj loĝas en Israelo, „devas vivi sub konstanta minaco“. Laŭ Gitelman, Putin publike ĉirkaŭbrakumas la judojn, ĉar li volas eviti riproĉojn pri anisemitismo, kiujn oni eventuale povus direkti al li lige kun la malafabla traktado de Gusinki, Berezovskij kaj Ĥodorkovskij. Kompare kun la postsovetiaj landoj, kie vivas milionoj da rusoj, kiujn Moskvo pretendas protekti, ne estas konate, ke Putin intencas enmiksiĝi en la israelan politikon, ĉar tie loĝas unu miliono da rusaj judoj.

Kiel oni povas legi en la aŭtobiografio de Putin de la jaro 2000, en sia infanaĝo li amikis kun juda familio, kiu vivis en la sama loĝbloko en Leningrado. Ankaŭ lia sporta trejnisto, iu Anatolij Raĥlin, estis de juda deveno. Bronfman konsideras tiun parton de la memuaroj de Putin kiel bonvenan okazon por enluli (certajn) judajn mediojn je sia favoro. Sed probable Putin rilatas indiferece al la judoj, same kiel li

²⁹ Vd. <http://www.seewald.ru/putinsrede-im-juedischen-toleranzzentrum-in-moskau>. Vd. denove piednoton 13.

³⁰ Vd. <http://globalvoicesonline.org/2014/07/14/putin-tells-rabbis-that-goebbels-was-talented>, <http://www.kremlin.ru/news/46180> kaj <https://terraherz.wordpress.com/2014/07/09/putin-uber-holocaustleugnung-und-kriegpropaganda-u-lugen-damals-und-heute>.

³¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Berel_Lazar.

³² Vd. <http://www.faz.net/aktuell/feuilleton/russlands-feindbilder-putin-und-die-juden-13402003.html>

indiferente rilatas al preskaŭ ĉio cetera. Laŭ Stanislav Belkovskij, kiu eble ne estas la plej kredinda aŭtoro, Putin eĉ ne respektas la propran rusan popolon.³³

Miĥail Ĥlenov, ĝenerala sekretario de la „Eŭrazia Juda Kongreso“, opinias ke „dank’ al Putin kaj ties porjudaj inklinoj“ en Ruslando malofte okazas antisemitismaj ekscesoj. Por eviti ilin estis alprenitaj severaj leĝoj. Sed oni ne forgesu, ke la samaj leĝoj povas servi ankaŭ por persekuti, subpremi kaj puni aktivulojn, kiuj agas kritike al la rusa reĝimo, kiel ekzemple Pussy Riot, Naval’nyj aŭ aliaj opoziciuloj, por kiuj Ruslando nuntempe estas tre malmola betono. Tio signifas, ke la samaj leĝoj povus direkti sin ankaŭ kontraŭ judoj, se ili elpaŝus kiel opoziciuloj kaj kritikantoj de Putin. Laŭ Miĥael Edelstein, docento en la moskva Lomonosov-universitato kaj ĵurnalisto de la gazeto *L’ĥaim*, „Putin eble estas bona por la judoj, sed li tamen estas malbona por Ruslando“. Klara vidpunkto.

Aŭŝvico 2015

Kiam la 27an de januaro 2015 la mondo rememoris la liberigon de la koncentrejo en Aŭŝvico okaze de la 70a datreveno de tiu evento, Putin mankis en Aŭŝvico. La Kremlo plendis, ke Putin ne ricevis specialan inviton, kvankam en la memor-ceremonio dek jarojn antaŭe li ankoraŭ ĉeestis kiel honora gasto. La polaj organizantoj klarigis, ke ĉi-foje ŝtatestroj ne ricevis oficialan inviton kaj ke oni nur informis la registarojn pri la planita okazaĵo en Aŭŝvico (kio probable estis ruza truko por eviti la alvenon de Putin). Sergej Lavrov, ministro pri eksteraj aferoj de Ruslando, estis citita per la klarigo, ke la rusa ambasadoro en Varsovio ja ricevis leteron de la direktoro de la muzeo en Aŭŝvico, en kiu estis skribite „venu, se vi volas, kaj komuniku al ni, kiu ankoraŭ venos“ de la rusa flanko. Pri la (mal)dezirindeco de la partopreno de Putin en tiu evento okazis en Pollando dum la antaŭaj monatoj verva diskuto, parte kun kuriozaj argumentoj. Grzegorz Schetyna, pola ministro pri eksteraj aferoj, klarigis, ke Aŭŝvico estis liberigita de „ukrainoj“, ĉar ĉe la liberigantoj temis pri ukraina taĉmento de la Ruĝa Armeo.³⁴ La pola prezidento Komorowski konfirmis tiun version en sia parolado dum la memor-ceremonio en la iama koncentrejo.³⁵ Rusaj civiluloj kaj rusaj judoj sentis sin provokitaj kaj reagis konsternite. „Agnoskante kaj respektante“ la historie signifan engaĝiĝon de Sovetunio dum la liberigo de Aŭŝvico, Komorowski faris ankaŭ komparon kun la krimoj dum la stalinismo, kio probable ĉagrenis la rusojn. La Kremlo riproĉis al la poloj, ke ili praktikas „kontraŭ-rusan histerion“ kaj „primokas la historion“. Certe, ambaŭ akuzoj estis maltrafaj.

Ankoraŭ samtage, Putin kaptis la okazon kaj prezentis siajn vidpunktojn. Dum la memor-ceremonio en la „Juda Muzeo kaj Centro de Toleremo“ en Moskvo,³⁶ kie li eklumigis kandelon kune kun la ĉefrabeno de Ruslando, Ber(e)l Lazar,³⁷ Putin bedaŭris en sia parolado la sorton de la judoj dum la holokaŭsto kaj menciis, ke pli ol duonmiliono da judoj servis en la Ruĝa Armeo, ke pli ol kvardek mil judoj batalis en partizanaj taĉmentoj kaj ke ducent mil pereis.³⁸ Krom tio, Putin emfazis, ke estis neniu alia ol la sovetia armeo mem, kiu liberigis Aŭŝvicon, kaj ke oni ne forgesu, ke inter la 70 procentoj de ĉiuj batalantoj de tiu armeo cetera tamen troviĝis rusoj. En la dua parto de sia parolado Putin krude utiligis la okazon por fari politikan propagandon: Li rifuzis la „pretendon de la monda hegemonia regado“ fare de iu ajn potenco kaj avertis pri la „tragediaj“ sekvoj de „provoj de perforta premo kontraŭ suverenaj ŝtatoj kaj nerespektado de iliaj rajtoj“. Ŝajnas, ke la riproĉoj de Putin, kiu kutimas inversigi la faktojn, estis direktitaj al la publiko en Eŭropo kaj Usono. Aludante la aktualan situacion en sudorienta Ukrainio, kie „oni pafas kontraŭ la paca popolo de Donbaso“, li kritikis la aplikadon de „duoblaj normoj kaj la indiferentecon pri la sorto de aliaj“, kio laŭ li ne estas akceptebla. Antisemitismo estis menciita kune kun

³³ Vd. lian libron *Wladimir. Die ganze Wahrheit über Putin*.

³⁴ Fakte, la koncentrejo de Aŭŝvico estis liberigita de soldatoj de la 322a divizio, kiu estis parto de la 60a armeo de la 1a Ukraina Fronto de la Ruĝa Armeo (vd. http://en.wikipedia.org/wiki/322nd_Rifle_Division_%28Soviet_Union%29 kaj <http://www.pobisk-pobeda.ru/forum/index.php?topic=2060.0> kaj <http://expert.ru/expert/2015/05/vospitalis-posle-osvetsima>).

³⁵ Vd. <http://www.president.pl/en/news/news/art.770.address-by-the-president-at-the-commemoration-ceremony-of-the-70th-anniversary-of-liberation-of-kl-auschwitz-birkenau.html>.

³⁶ Retpaĝoj kun informoj estas troveblaj sub http://en.wikipedia.org/wiki/Jewish_Museum_and_Tolerance_Center kaj <http://www.jewish-museum.ru>.

³⁷ Foton vd. sub <http://www.faz.net/aktuell/politik/holocaust-gedenktage-putin-warnt-vor-geschichtsfaelschung-13393414/nach-seiner-rede-entzuendete-13393492.html>

³⁸ Interese ke tiu informo ne estis ripetita en la parta dissendo de la parolado en la vesperaj novaĵoj en RTR Planeta, kiujn oni povis ricevi en Svislando.

rusfobio, „homara malamo“ kun „maltoleremo“, „primitivaj instinktoj“ estis riproĉitaj al „naciistoj, ekstremistoj, teroristoj en niaj landoj kaj regionoj“. Kvazaŭ kiel avertito al la adreso de la Okcidento, kiu laŭ li kulpas pri la konfliktoj, militoj kaj agresoj en Ukrainio, la demagogo el la Kremlo, kiu ŝatas tordi la aferojn, diris: „Kiel la historio montris, tie, kie oni enbatalas en la kapojn de la homoj ideojn pri nacia kaj rasa superecoj, semas semojn de malamo kontraŭ aliaj popoloj, detruas kaj primokas la tradiciajn homajn valorojn, tie la civilizo rapide kaj neeviteble transformiĝas al vera barbareco, kaj la pacon anstataŭos kruelaj konfliktoj, militoj kaj agresoj.“³⁹ Se Putin estus direktinta tiujn frazojn al tiuj, kiuj portas la veran respondecon pri la militaj agresoj en orienta Ukrainio kaj pli frue ankaŭ en Kartvelio kaj Ĉeĉenio, oni povus konsideri tiun ĉi politikiston iom pli serioze. Se iu „prisilentas“, „tordas“ aŭ „reskribas la historion“, kio estas „nepermesbla“ kaj „senmorala“, kiel Putin plendis kaj avertis, tiam estas neniu alia ol la rusoj mem, kiuj devus senti sin koncernataj. Ŝajnas do ke la iama KGB-agento bone lernis sian lecionon en la lernejo de la „talentita mensoganto“ Goebbels, kiu kurioze havis la saman antaŭnomon kiel Stalin kaj kulpigis la judojn pri la militoj en la mondo.

Rabeno Lazar montris sin „eterne dankema“ al la Ruĝa Armeo. Ĉi tiu flatema konduto postlasis iom strangan impreson, sed ĝi fariĝas komprenebla, se oni scias, ke la „Moskva Juda Centro kaj Centro por Toleremo“, kiu estis malfermita en 2012, ĝuis ŝtatan sponsoradon, kiu laŭ Gorin estas dankinda al Putin persone, kiu ebligis ankaŭ la konstruadon de novaj sinagogoj kaj komunumaj centroj en tuta Ruslando, precipe *ekster* Moskvo, kaj helpis la organizadon de jaraj renkontiĝoj kun judaj pintuloj. Intertempe Ĥabad establis sin en tuta Ruslando kaj fariĝis ĉefa religia esprimformo de la judaro. Miĥael Oŝtraĥ, reprezentanto de la juda komunumo en Jekaterinburgo, observas tiun tendencon malvolonte, ĉar li timas, ke tiu evoluo, t.e. la prioritata traktado de la Ĥabad-movado fare de la ŝtato povus „konduki al monolitismaj judaj institucioj, kiuj evitas ĉian evoluon de sube, sed ĝuste en tio situus la efektiva juda renoviĝo“.⁴⁰

Kiel iu observanto de la evento en la „Moskva Juda Muzeo“ raportis, dum la prezentado de filmo sur la ekrano aperis fotografiaĵoj de la lokoj de la nenigo, sed mankis bildoj pri viktimoj kaj tipaj kruelaĵoj; montritaj estis nur senhomaj stratoj, reloj, barakoj kaj la nomoj de Sobibór, Treblinka, Majdanek, Aŭŝvico.⁴¹ Plumpa historiografia manipulado sen fino ankaŭ en tiu ĉi kazo! Alla Gerber, gvidantino de la „Moskva Centro pri la holokaŭsto“,⁴² klarigis, ke en Sovetunio oni neniam oficiale memoris pri la holokaŭsto, kaj baldaŭ post la milito Stalin lanĉis antisemitisman kampanjon kontraŭ judaj kuracistoj.⁴³ Mi mem aldonu la klarigon, ke en la sovetia historiografio, kiun oni povas konsideri grandparte kiel pluman mensogan kaj falsitan propagandadon, la holokaŭsto ne estis perceptita, traktita kaj esplorita kiel aparta tragedio de la judoj sed prezentita kiel margena evento kadre de la „hitlerfaŝisma milito kontraŭ la *sovetia popolo*“, en kiu la judoj estis unu el multaj viktimoj, ofte ne aŭ plej laste menciitaj en la vico kun aliaj popoloj. Fakte, la prisilentado kaj reinterpretado de la holokaŭsto fare de la sovetia historiografio estis „nepermesbla“ kaj „senmorala“, por uzi la vortojn de Putin, kiu ne maltrafas ĉiun okazon por krude enmiksiĝi en la historion, kiun li celas revizii kaj ‘reordigi’ laŭ sia persona gusto, tordante kaj renversante la pruvitajn faktojn. Anstataŭ reinterpreti aŭ eĉ prisilenti certajn historiajn faktojn, la rusoj farus pli utilan kontribuon al la historiografio, se ili komencus objekte kaj honeste okupiĝi pri sia historia pasinteco, kio inkluzivas ilian okupacion de tuta orienta Eŭropo inter 1945 kaj 1990, kiu sekvis post la liberigo de Aŭŝvico. Ŝajnas ke la rusoj ankoraŭ ne pretas kaj kapablas fari tion.

Do, instruojn el Ruslando la mondo vere ne bezonas – la okazaĵoj dum la holokaŭsto estas sufiĉe bone konataj, dokumentataj kaj ellaborataj de historiistoj el diversaj landoj, ĉar la postvivantoj, kiuj fariĝis atestantoj de tiu terura tragedio, sufiĉe multe rakontis pri ili. Dum multaj rusaj arkivoj daŭre estas fermitaj aŭ denove fermiĝis en la Putin-erao, je la granda ĉagreno de rusaj kaj eksterlandaj historiistoj, en la sepdek jaroj de post la fino de la dua mondmilito la homaro eksciis pli multe pri la holokaŭsto, ol Vladimir Putin, la pseŭda historiisto de la Kremlo, kiu ŝatas misuzi la historiajn faktojn por fari primitivan propagandon en propraj nomoj kaj intereso, povas imagi.

³⁹ Vd. <http://kremlin.ru/news/47529> kaj <http://www.tagesschau.de/multimedia/sendung/nm-3271.html>.

⁴⁰ Vd. <http://www.juedische-allgemeine.de/article/view/id/18689>.

⁴¹ Vd. <http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/Putin-warnt-vor-Streben-nach-Weltherrschaft/story/25829887>

⁴² Koncernan repaĝon vd. sub <http://www.holocf.ru>, <http://de.holocf.ru>, <http://en.holocf.ru>.

⁴³ Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Kazo_de_kuracistoj.

Konsiderante ĉiujn supre menciitajn cirkonstancojn, persone mi pensas, ke estis pli bone eviti, ke Putin ĉeestu la memor-ceremonion en Aŭŝvico en la nuna jaro, ĉar la risko, ke li povus misuzi ĝin por nova hontinda skandalo, estis reala. La ideo, ke la ĉeesto de Putin en Aŭŝvico povus esti nova ŝanco por repaciĝo, estus certe tro naŭva kaj iluzia. Verŝajne kun tia Putin repaciĝo ne okazos, ne povos okazi. Pro tio Aŭŝvico ne estis la taŭga loko por li. Bedaŭrinde, Ruslando ne kapablis sendi pli dignan oficialan reprezentanton, ekzemple Miĥail Gorbaĉov, kiu estas pli bonvena en Okcidento kiel 'morala instanco' ol Putin, Medvedev aŭ Naryŝkin, anoj de la sama bando. Sed intertempe evidentiĝis, ke ankaŭ Gorbaĉov restis lojala al si mem kiel iama sovetia imperiestro, ĉar li apogas la eksteran politikon de Putin, je la grandaj seniluziigoj kaj ĉagreno de la internacia publiko. Kiel ajn, en tiu tago la voĉo ne apartenis al la politikistoj, sed ĝin prave havis la eksviktimoj de Aŭŝvico, de kiuj restis nur malmultaj. Ili certe ne bezonas nek meritas cinikajn vortojn prononcitajn tra la buŝo de malhonestaj politikistoj el Ruslando, nek ilian senliman malamon, kiun ili verŝas kontraŭ la cetera homaro kun la celo provoki novajn militojn en diversaj lokoj de la mondo.

PS Okaze de Pesaĥo 2015, Putin sendis al la ruslandaj judoj jenan salut-mesaĝon: „Mi gratulas al la ruslandaj judoj okaze de la Pesaĥa festo. Ĉi tiu festo estas praktikata precipe de la posteuloj de la judismo. Ĝi memorigas ilin pri la okazaĵoj en la fora antikva tempo, pri la liberiĝo de la hebreoj de la sklaveco, pri la grandaj idealoj de libereco, justeco kaj kreado, kiuj ankaŭ nuntempe havas ĝenerale homaran signifon. Estas ĝojige, ke la vivo de la juda komunumo de nia lando aktive disvolviĝas. Fondigas novaj religiaj kaj klerigaj centroj, estas gvidata granda bonfara kaj kleriga laboro, malfermiĝas modernaj muzeoj kaj ekspozicioj, vastiĝas interregionaj kaj internaciaj kontaktoj. Tia multspaca aktiveco estas ege grava en nia socio por fortigi la pacon kaj harmonion inter la popoloj, por formadi etoson de toleremo kaj interkompreniĝo. Ankoraŭfoje – gratulon okaze de la festo! Mi deziras bonan sanon, feliĉon, sukceson kaj prosperon.“⁴⁴

Ŝajnas ke tiu mesaĝo enhavas multe da ciniko, se oni konsideras la fakton, ke, aliflanke, iuj aliaj etnoj kiel la tataroj de Krimeo suferas denovan subpremado post la anekso de la duoninsulo fare de Ruslando.

© Andreas Künzli, www.planlingvoj.ch, 27 januaro 2015

La aŭtoro (nask. 1962 en Svislando) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91. Ekde 1985 li plurfoje vizitis Sovetunion, kun pli longa restado en Moskvo en 1988/89, kaj revizitis Ruslandon en 1991, 2003 (Volgia regiono) kaj 2005 (Kaliningrado). En Ukrainio li restadis plurfoje komence de la 90aj jaroj. Li flue legas kaj parolas la rusan kaj komprenas la ukrainan lingvojn.

⁴⁴ La ruslingvan tekston vd. sub <http://kremlin.ru/events/president/news/49080>.